

## & Senhareco:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 774 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo kaj disduigo na strofoj. Klarigoj (\*): '12 Monunuoj, francavro. '13 Kristana festo en komenco de januaro.>

### (#Melodio:

<:43> (

/So dodo mire doTi do do;do LaLa Lado TiLa So do;So FaFa FaLa SoFa Mi So;do dore mire doTi do do;

(#Rekantaĵe: dodo mimi redo mi Ti; La do dodo TiLa So do; dore mire doTi do do; La fa mire soTi Ti do)

)×18 )+

### (&Strofoj:

'1 /Amikoj miaj min kompatis ; Dirante, ke mi perdas harojn, ; Kaj efektive mi konstatis, ; Ke... ke mi perdas miajn harojn,

(×: **En la danco paŝu kara ; Ĉu vi estas aŭ ne hara ; Jen demando senkompara ; En la danco paŝu kara!**)

'2 Ĉar ĉiutage ekzemplero ; De mia malfidela trupo ; Forlasas min kaj... per kulero; Mi kaptas ĝin... en mia supo! .....

'3 Kaj miaj bonaj geamikoj ; Pretendis kun mordanta sprito, ; Ke al fabriko de penikoj ; Mi ilin vendis (kun profito) .....

'4 Kaj ili ĵuris tre sincere ; "Nun estas fakto, ho karulo, ; Ke via kapo vere-vere ; Aspektas kiel bilardbulo!" .....

'5 Min tre ĉagrenis tiuj moko ; Kaj mi aĉetis kuracilon ; Laŭdatan en gazetalvokoj ; Por tuj ekstermi la bacilon! .....

'6 Kaj la vendisto min konvinkis ; "Dek litroj, ... estos ja necese!" ; Mi ilin prenis kaj... eĉ trinkis, ; Sed bedaŭrinde sensukcese... ..

'7 Mi poste al doktoro iris ; Konata fame trans la maroj, ; Kaj sendemande tuj li diris ; "Sinjor', vi venas por la haroj! .....

'8 Sed mi kuracos vin rapide ; Per novsistema energio; Rekreskos haroj, tre solide, ; Dank' al la aŭtosugestio!" .....

'9 Kaj laŭ ordono de l' doktoro ; Mi diris aŭtosugestie ; "Mi havas harojn, je l' honoro!" ; Kaj mi ĝin diris ĉiam, ĉie; .....

'10 Ĝin aŭdis foje strata bubo ; Kaj tuj dekretis kiel papo ; "Vi havas harojn, jes, sen dubo, ; Sed certe ne sur via kapo!" .....

'11 Mi ne plu kredis la promeson ; De la scienca medicino ; Kaj tial serĉis la adreson ; De pli fidinda sorĉistino. ....

'12 Mi trovis ŝin kaj ĉe l' akcepto ; Ŝi diris: "Havu multajn dankojn! ; Por harkreskigo jen recepto, ; Ĝi kostas ducent-kvindek frankojn\*." .....

'13 Mistere kun ceremonio ; Ŝi flustris nun per raŭka tono ; "La tagon post Epifanio\* ; Vi prenos grenojn el melono, .....

'14 Vi prenos denton de simio ; Kaj voston de graveda rano ; kaj pistos ĉion per kranio ; De trimonata suĉinfano. ....

'15 Al tio ĉi vi akurate ; Almiksos sangon de ŝtatestro ; Kaj krucsignante vi sabate ; Trifoje kraĉos tra l' fenestro. ....

'16 Vi poste ŝmiros per fluido ; Laŭlonge ĉiam de l' vertebro..." ; Mi eĉ ne diris "ĝis revido" ; Sed mi forkuris kiel zebro! .....

'17 Mi turnis min kun nova kredo ; Al komercisto belpromesa, ; Laŭ li, nur lia harrimedo ; Montriĝis taŭga kaj sukcesa. ....

'18 Li kun rideto tre honesta ; Mezuris kapon kaj la nukon ; Kaj kontraŭ sumo tre modesta ; Li vendis nun al mi... perukon!! .....